# « Le Groupe Esperanto du Maine » salutas vin !

## *Bonvenigaj vortoj*

*« Akceptu tion kion vi ne povas ŝanĝi, ŝanĝu tion kion vi ne povas akcepti » laŭ Marc-Aurèle*

## *Enhavo*



- Sarta arkivo pri esperanto p1
- Lokaj aktualaĵoj: Vizito al la Bizarejo p2
- Esperantaj simboloj p3
- Rezoluco de la UK 2023 en Torino p4


Ni vizitis la Arbovartejon de Norbert Menu,



En februaro 2023, ni vizitis la « Arboretum » en la urbo le Mans kun diversaj asocioj.
S-ro Norbert Menu, pli ol okdek jaraĝa, esperantiĝis jam de longe kaj li dediĉis sian emeritan statuson al la kreado de tiu impona vartejo.

**En junio 2023 okazis la 100-a datreveno de la mond-fama kurado « Les 24 heures du Mans » 1923-2023**




**Memoraĵo !**

**La muzeo de la Pergameno en la urbo Rouillon, apud le Mans 2011-2013**




En decembro 2011, la mansa grupo GEM gastigis Aleksander Melnikov, fama esperantisto el Rostovo ĉe Dono, rusa urbo ĝemelita kun le Mans ekde 1981.
Inter diversaj oficialaj invitoj, prelegoj, ni organizis vizitojn en la malnova urbo Le Mans kaj en la freŝa muzeo de la Pergameno.
Okazis samtempe nia tradicia Zamenhofa Tago kun regionaj grupoj.
Mirinda vojaĝo ĝis la kreado de vera pergameno, fare de simpatia paro, inicianto de tiu ateliero.



*Aleksander kaj Jak, prezidanto de la GEM en 2011*

Bedaŭrinde, en decembro 2013, tiu muzeo senrevene fermis siajn pordojn pro manko de financaj subtenoj de la lokaj municipoj.
Ĝi neniam ricevis la oficialan nomon *muzeo* sed estis tiam agnoskita nur kiel *metiejo* kaj ne ricevis subvenciadon.

https://www.youtube.com/watch?v=zTIFdxX-4lI
https://www.youtube.com/watch?v=REGE1fJVQkQ



*Aleksander Melnikov dum turneo en 2011*

# Ni vizitu la « Arboretum », la arbovartejon de Norbert Menu.




Ekde 1989 sur kvarhektara tereno en la urbo Le Mans, S-ro Norbert Menu kreis arbovartejon: tie kreskas proksimume 2000 arboj kaj arbustoj el la tuta mondo.
En la jaro 1989, post sia vizito de la « ĝardeno de Albert » en la urbeto Moutiers les Maufaits, en la departemento Vendeo (Francio), Norbert decidis, ke tiu bieno aĉetita kelkajn jarojn antaŭe, iĝos sia arbovartejo, alinomita Bizarejo.



Ek al la laboro! Feliĉe, lia emeritiĝo en la jaro 1994 faciligis tiun realigon.
Kaj nun, malgraŭ la evidenta manko de spaco, Norbert ĉiam serĉas « la raran aŭ bizaran arbon » en ĉiuj vizititaj ĝardenoj…
Li proponas al la publiko vizitojn dum kiuj li esprimas kaj komunikas sian pasion.
Ĉiu arbo havas sian historion: plantadon, surskribadon, aklimatigon.
Ĉu ĝi estas medicina planto…
Necesas lin haltigi, ĉar oni riskas fini la viziton nokte, uzante poŝlampon…okazis ia foje!

Kion oni povas trovi en tiu Bizarejo?
En iu masivo kun aldono de eriko-tero, kreskas: *Acer japonicum, Camellia, amamelis, Daphniphylum, Ilicium, Osmanthus, Pierris*… en iu malseka parto: Likvidambaroj, aùtun-koloraj Taksodioj, en iu protektata kurbo de rojo, kreskas specoj pli delikataj: Kriptomerioj, Palmoj, Bananarboj, *Amanthotaxus*, *Asimina,Taiwana*, *Callistri*s, *Cinnamonum*, *Dacrycarpus*, *Drymis*…
François, filo de Norbert, de la komenco partoprenis la kreadon, kaj de kelkaj jaroj li transprenis la stafetbastonon kaj daŭrigis tiun projekton.

La Grupo Esperanto de « le Maine » plurfoje vizitis tiun Bizarejon. En 2019, du esperantistoj Norman, estro de ĝardenistoj en Montrealo, kaj lia edzino Zdravka multe ŝatis la viziton kaj interŝanĝon kun Norbert.
De kelkaj jaroj, pro la klimato-ŝanĝo okazis gigantaj fajroj en la mondo. La Arbovartejo de Norbert, per sia riĉeco, kontribuas al la replantado de detruitaj arbaroj en diversaj landoj.

[http://lagrandpree.free.fr/esperanto-presentation.htm](http://lagrandpree.free.fr/esperanto-presentation.htm)



*En 2019, Norbert kun Zdravka kaj Norman*




# Esperantaj simboloj
# (en la revuo Bonavolo)

### La verda stelo


Tradicie la kvin pintoj reprezentas Amerikon, Eŭropon, Afrikon, Azion kaj Oceanion.
La verdo simbolas esperon.
La plifirmiĝo de la stelo kiel simbolo de Esperanto datiĝas de la lastaj jaroj de la 19-a jarcento.

### La esperanta flago



La flago estas plivastigo de la verda stelo, prenante la saman koloron kaj signifon kaj aldonante la blankon por reprezenti pacon kaj neŭtralecon.
Komence ĝi estis la flago de la esperanta klubo de Bulonjo-ĉe-Maro (Francio).
Oni disvastigcele adoptis ĝin en tiu urbo profite de la 1-a Universala Kongreso de Esperanto, en 1905.

### La jubilea simbolo de esperanto



La jubilea simbolo reprezentas la idealon de la lingvo: kunfratiĝo de ĉiuj. La du flankaj duonoj reprezentas la latinan literon **E** (**E**speranto) kaj la cirilan **Э** (**Э**сперанто), simbolante la unuiĝon de Okcidento kaj Oriento.

La jubileo de Esperanto estis festita en 1987 en Varsovio dum la 72-a universala kongreso de Esperanto en kiu partoprenis preskaŭ 6 000 homoj.
Tiuokaze estis kreita la jubilea simbolo, kiu estas hodiaŭ ofte uzata kiel simbolo de Esperanto.

Fontoj:
https://fr.wikipedia.org/wiki/Jubil%C3%A9
https://fr.wikipedia.org/wiki/Fichier:Jubilea_simbolo.svg




La 1 318 partoprenantoj de la 108a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Torino, Italio, inter la 29a de julio kaj la 5a de aŭgusto 2023, traktis la temon “Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj”. La partoprenantoj, alvojaĝintaj el 69 diversaj landoj, ne nur diskutis la temon, sed spertis kaj vivis ĝin: ĉar ĉiuj partoprenantoj parolas la internacian lingvon Esperanto, neniaj lingvaj baroj malhelpis interkomunikadon kaj efektive, konforme al la kongresa temo, la homaj valoroj de ĉiuj ĉeestantoj kunfluis – en harmonia etoso.

Multaj esperantistoj raportis pri propraj spertoj kiel migrantoj. Ili emfazis, ke la scio de la lingvo Esperanto ja helpas por ricevi subtenon en la komenco de nova vivo, sed esenca estas la lernado de la nacia lingvo de la koncerna lando, por povi integriĝi en la socion.

Tio validas por ĉiuj migrantoj – ĉu ili libervole elektis translokiĝi al alia lando aŭ ĉu ili devis fuĝi el sia hejmlando pro milito, mizero aŭ persekuto.

*Sekve, la kongresaj partoprenantoj notis jene:*

1. La civila socio en la gastiganta urbo Torino donas modelan ekzemplon por la integriĝo de migrantoj kaj precipe rifuĝantoj en la socion.
2. Kun zorgo la kongresanoj konstatas, ke la nombro da rifuĝantoj en la mondo en la pasinta jaro unuafoje superis la ciferon de 100 milionoj. Ni avertas, ke pro la klimatŝanĝiĝo pli kaj pli da homoj estos devigataj forlasi sian hejmon.
3. Ni alvokas ĉiujn ŝtatojn de la mondo ĉesigi la kaŭzojn de malvolonta migrado kaj ni subtenas la klopodojn de Unuiĝintaj Nacioj kaj de la aliaj superŝtataj organizoj mildigi, se ne solvi la problemojn.
4. Ni apelacias al la ŝtatoj, kien venas rifuĝantoj, akcepti ilin kaj doni al ili ĉiun subtenon por povi establi memstaran, liberan vivon. Ni estas konvinkitaj ke migrado fine rezultigas pli riĉan kulturon kaj pli bonstatan socion en tiuj ŝtatoj mem. Ni agnoskas la historian valoron de migrado – migrado estas bazo por la evoluo de la homaro.
5. Ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj garantii al migrantoj povi vivi sen lingva diskriminacio kaj sen ajna alia diskriminacio, alivorte: ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj sekvi la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj proklamitan en la jaro 1948.
6. Nun, en la jaro de la 75a datreveno de la akcepto de la Deklaracio de Homaj Rajtoj, ni konstatas kun zorgo ke tiuj rajtoj ne estas respektataj en multaj partoj de la mondo.
7. Tial ni estas solidaraj kun rifuĝantoj kaj ni emfazas, ke la Homaj Rajtoj estas universalaj rajtoj kiuj validas por ĉiu individuo tutmonde, ankaŭ por migrantoj.

*Torino, Italio, 5 aŭgusto 2023*

108-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
TORINO 29.07-05.08.2023

**UNIVERSALA DEKLARACIO**

**DE LA HOMAJ RAJTOJ**

Artikolo 19

*Ĉiuj havas la rajton je libereco de opinio kaj esprimado; ĉi tiu rajto inkluzivas la liberecon havi opiniojn sen intervenoj de aliaj, kaj la rajton peti, ricevi kaj havigi informojn kaj ideojn per kiu ajn rimedo kaj senkonsidere pri la lanlimoj.*

*Eldonis UEA en 2016*




# La G.E.M esperas ke ĉiuj tre bone feriis

